

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 31/10/2019 Kvarcentkvardeknaŭa eldono (unua eldono 20/09/2011)



### Subtenu vian novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer [rogerspringer@tpg.com.au](mailto:rogerspringer@tpg.com.au);

**Uzindaj ligoj** [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)

Entute **809,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **296,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)


Nun studas **279,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **234,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)*

### Gramatika serio "La Verbo en P.A.G.". N.ro.91



La tabelvortoj por kvanto estas "iom" k.t.p.: "Tio absolute neniom pligravigus la libron". Notu ke "iom da" = iu kvanto, kaj "iom ajn" substrekas la nedifinecon de la kvanto. Dum "malmulte" estas "iomete", multe estas iomege".

Notu la diferencon: "Venu kiel eble plej rapide" = "Venu kun la maksimuma rapideco", dum "Venu kiom eble rapide" = "Venu rapide, sed nur tiel rapide, kiel vi povas".

Pluformadoj: iomete; tioma; kioma.

La -aŭ-adverboj ne estas speciala klaso de adverboj: ili simple estas "nudaj adverboj", adverboj sen finaĵo, kiuj, se dezirate, povas ricevi la ekstran kategorian finaĵon \_o, aŭ -a, aŭ -i (aŭ -e kelkfoje). La literoj "aŭ" estas simple parto (la lasta parto) de la radiko, kaj tial neniam povas forlasati.

Krom adverboj, ekzistas kelkaj aliaj vortoj kies radiko

finiĝas hazarde per la literoj "aŭ": ambaŭ; kvazaŭ; naŭ; kontraŭ.

(daŭrigota) **Marcel Leereveld**



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**



## La Manlia Esperanto-Klubo



Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm ĝis 12 tagmezo, Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagota kafo atendas vin. La 19a de oktobro estis la tria sabato. Venis Roger, John, Michael kaj Ian. Ni trovis ke la Bavarian Café estas reparata por alia semajno. Ne gravis, ni trinkis kafon ĉe la apuda Gloria Jean's Café



Roger Springer



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

## Tiklaj problemoj en mia ĝardeno.

### HORTEMPOJ TEMPOPERDAJ .

Iam en la urbcentro kun Alida, mia edzino, ni devis fari malsamajn aferojn kaj tial ŝi diris "Mi renkontos cin ĉi tie je la horo duono antaŭ la kvina" (nederlande: *half vijf*). Ni normale parolis en ambaŭ lingvoj, la angla kaj la nederlanda, kaj ankaŭ miksite. Post malkuniĝo mi pensis, ke ŝi diris tion en la angla "*Half past five*", sed ŝi pensis ke ŝi diris tion en la nederlanda, kiu diras "*half five*", "*half vijf*", kio signifas "duono antaŭ la kvina". Ambaŭ memoris nur la du vortojn "duono" kaj "kvin". Do mia edzino venis je la nederlanda horo, "*half vijf*", kiu signifas "duono antaŭ la kvina", kaj devis atendi tutan horon ĝis kiam mi alvenis laŭ la angla "*half (past) five*" ĉar mi memoris nur la vortojn "duono" kaj "kvin", kaj se oni memoras nur la vortojn "duono" kaj "kvin", la horo estas en la nederlanda (kaj germana) duona antaŭ la kvina kaj en la angla (kaj franca) duono post la kvina.

Alian fojon, je iu Lundo en la Melburna Esperanto-Asocio, mi diris al amikino "Mi vizitos cin proksiman Merkredon, "*next Wednesday*" je la tria horo". Mi iris al ŝia domo du tagojn post tio sed ŝi atendis min naŭ tagojn poste, ĉar la melburna "*next Wednesday*" signifas la Merkredon de la proksima semajno, kaj por diri "*next Wednesday* de la sama semajno" mi devus diri "*this Wednesday* (ĉi tiun Merkredon)", por la Merkredo de ĉi tiu semajno. Mi ankoraŭ ne scias, ĉu la melburnanoj konsekvence diras simile por la pasinteco, do ĉu ili diras je Vendredo "Mi vizitis ŝin ĉi tiun Merkredon", "*this Wednesday*", kaj "Mi vizitis ŝin "*last Wednesday*", la ĵusan Merkredon" = la Merkredo de antaŭ naŭ tagoj, ja en la ĵusa semajno.

Marcel.

### KAJ VIA AĜO ?

Mi dividas la aĝojn de la homoj (kaj certgrade de aliaj animaloj) jene: **1e.** "infanaĝo" de naskiĝo ĝis kun la dekdua jaraĝo, **2e.** "interaĝo" (= adolescence = inter infaneco kaj plenkresko) de la jaro 13 ĝis kun la jaro 19, **3e.** "plenkreskaĝo" de la jaro 20 ĝis la jaro 79, kaj **4e.** "maljunaĝo" de la jaro 80 ĝis eterne. Se necese, mi subdividas la infanaĝon en Infanetaĝo kaj Juninfanaĝo kaj Mezinfanaĝo kaj Malfruinfanaĝo. La interaĝon en Fruinteraĝo kaj Mezinteraĝo kaj Malfruinteraĝo. La plenkreskaĝon en Fru-, Mez-, kaj Malfruplenkreskaĝoj. Kaj la maljunaĝon en Malpostcentjaraĝo kaj Postcentjaraĝon.

Marcel.

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

## KAJ NIAJ PROVINCOJ ?

Ni trovas stranga, nomi niajn “states” provincoj, sed ni vere ne povus nomi ilin en Esperanto “ŝtatoj”, ĉar ŝtato estas lando kun kompleta memdecido kaj mempotenco. Niaj “states” ne estas, kvankam ili havas kelkajn pliajn rajtojn ol la provincoj en eŭropaj landoj. La samo aplikiĝas al la usonaj “states”, kiuj nomiĝu same “provincoj.

Alia afero pri niaj provincoj: la nomoj de kvin da ili el la ok estas tro longaj. Pro tio kelkaj, aŭ multaj, aŭstralianoj uzas mallongigojn por kelkaj: Vestralio por *Western Aŭstralia*, *The North* por *Northern Territory*, *Canberra* por *Capital Territory*, kaj *NSdoubleyou(U)* (pli bona estus *Eneswe*) por *New-South-Wales*. Ankoraŭ ne aperis “*Southstralia*”. Por Esperanto ni kapablas uzi pli mallongajn tamen klarajn nomojn, sed *Ralph Harry*, kiu praktike sola kreis la aŭstraliajn nomojn geografiajn por la A.d.E., ne faris tion kaj kreis kelkajn neesperantecajn nomojn, nome konsistantaj el du aŭ tri vortoj por nur unu afero, tre stranga. Bonŝance geografiaj nomoj ne estas oficialaj, escepte de kelkaj de Zamenhof kreitaj.

Do mi uzas la jenajn esperantecajn nomojn por la provincoj: Vestralio; Nordstralio, Kvinlando; Ĉefurbejo; Njusaŭzvelso; Viktorio, Tasmanio; kaj Saŭstralio. Kelkaj urboj: Pertho kaj Sidneo. Mi almenaŭ uzas unu vorton por unu afero, kiel ankaŭ Njuzelando aŭ Novzelando. Kaj ankaŭ por kelkaj neaŭstraliaĵoj, kiel Novjorko aŭ Njujorko kaj Losanĝeloso kaj Novorleanso kaj Suomio (por Finnlando) kaj Portsajdo kaj Njukastelo kaj Ŝanghajo kaj Novkaledonio.

**Marcel Leereveld.**

## TIALO KAJ KIALO .

En n.ro 446 mi petis respondon al mia klarigo, kial la akcepto de “kialo” el la adverba subjunkcio “kial” estas malĝusta, kaj mi ankaŭ menciis la diversajn signifojn de “neologismo”. En n.ro 448 Donald donas sufiĉe detalan kaj utilan klarigon, kaj solvon, de la mikspoto ĉirkaŭ “neologismo” kaj oficialeco de Esperantaj vortoj. Samnumere li respondas al mia tezo pri la malĝusto derivi la substantivon “kialo” el la subjunkcio. Al ĉi tiu tezo Donald respondas nur menciante, ke mi ŝanĝis la oficialajn signifon kaj uzon de la oficiala vorto “kial”. Unue mi demandas min, kial li ne klarige refutis mian tezon, kaj due mi rifuzas akcepti ke mi faris tiun ŝanĝon ĉar mi diris ke “kial” signifas ekzakte “demando por ricevi la motivon por iu ago”. Do “kial” estas (speciala) demando kaj ne indikas ke la respondo jam estas konata, nur ke ni atendas la respondon. Se tio estas la kazo, la substantivo “kialo” ne povas enhavi aŭ esti la motivo (aŭ la kaŭzo). Tio ne signifas ŝanĝon de la signifo de “kial”, ĉar derivi (kialo) devas havi la saman radikan signifon (= kial). Demando estas demando kaj restas demando kiam oni ŝanĝas ĝin el de adverbo al substantivo (aŭ adjektivo ankaŭ). Do “kialo kaj kiala” estas demandoj, ne la respondo (tial) al la demando.

Liaj klarigoj pri la mikspoto de “neologismoj” montras ke Zamenhof tute malĝuste komprenis kion li mem diris pri la afero. Ekzemple liaj asertoj signifas ke teorie mi, kaj ni, rajtus ŝanĝi preskaŭ ĉiujn oficialajn vortojn al adaptitaj anglaj Esperanto-vortoj oficialaj. Kalocsay renversis tion, dirante ke neologismoj estas ĉiuj neoficialaj vortoj (= radikoj). Tiujn ĉiu Esperantisto rajtas proponi. Bonŝance kaj Donald kaj mi samopinias kun Ka’lma’n Kalocsay.

**Marcel Leereveld.**

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

**DEMOKRATECO KAJ DIKTATORECO .**

En niaj t.n. demokrataj landoj ni havas leĝojn kaj regulojn por certigi ke ni ne regatu de diktatoraj estaĵoj en nia socio. Leĝe homoj kaj aĵoj ne rajtas ŝteli el de ni nek difekti nin aŭ niajn posedaĵojn. Ekzistas certaj leĝoj por malebligi la ŝtaton diktatore trakti nin. Se iu ŝtelas el de ni aŭ difektas nin, tiu persono aŭ instanco metatas en malliberejon aŭ ricevas monpunon. En diktatoreco la ŝtato kaj amikoj de la diktatoro rajtas senpune difekti nin aŭ ŝteli el de ni. En demokrateco la ŝtato ne povas, teorie kaj ofte praktike, ne trakti nin diktatorece. Ni mem ankaŭ ne povas senpune diktatorece trakti aliajn ŝtatanojn, nek la ŝtaton mem. La demokrata ŝtato kun siaj leĝoj kaj polico zorgas ke ni estu liberaj, liberaj for de diktatoraj estaĵoj, kaj ĝi neniam helpas diktatorajn estaĵojn en nia ŝtato. Ĝi estas centprocente kontraŭ iu ajn diktatoraĵo, kiel ŝtelo kaj difekto. Ĝi kunlaboras kun aliaj ŝtatoj kiuj estas same demokrataj, internacie

Sed en plej multaj demokratecoj troviĝas, kontraŭnature, kelkaj diktatoraĵoj, kontraŭ la volo de la ŝtatanoj. Ekzemple en Aŭstralio la parlamentanoj rajtas ŝteli pli altan salajron por si mem, sen obei la normalajn regulojn pri salajroj. Alia diktatoraĵo en Aŭstralio estas la rajto de la ĉefministro sole deklari ĉu ni faru militon aŭ ne.

Alia diktatoraĵo estas la povo kiun la ŝtato, la registaro, alproprigis al si por kunlabori kun diktatoroj. precipe alilandaj. Normale ni volas kaj povas ne kunlabori kun diktatoroj, kun krimuloj, sed la aŭstralia registaro faras komercon, do kunlaboras, kun krimuloj, kiel la ĉina ŝtato. La aŭstralia registaro faras tiun kunlaboron kun krimuloj por fari profiton. Sed ĝi malkonsekvence praktikas tiun kunlaboron nur pro la profito, kaj ĝi ne kunlaboras, eĉ ne por profito, kun la enlandaj krimuloj, la ŝtelistoj kaj la difektistoj kaj la murdistoj. Kial ne? Se mi kunlaboras, por profito, kun enlandaj krimuloj, la leĝistaro punas min. Sed se nia ŝtato kunlaboras, por profito, kun ĉinaj estaĵoj kiuj laŭ niaj konceptoj ja estas krimuloj ĉar diktatoroj, nia leĝistaro ne punas nian registaron. Do permesi al iu, la ŝtato, kunlabori kun krimuloj estas en si mem krima kaj diktatora. Kaj nia t.n. demokrateco estas falsa demokrateco, en tiuj tri kazoj.

Kie estas nia senso de justeco kaj honesteco? Kaj ne estas nur Ĉinujo kiu krimas: ekzistas pluraj aliaj tiaj diktatoraĵoj. Ĉu ni ne almenaŭ devus ĉesigi tiun anomalion en nia lando?

Marcel Leereveld.

**KE-intervjuo**

Hieraŭ mi havis la honoron paroli dum pli ol horo pri miaj verkoj al anoj de Kultura Kooperativo Esperantista en Rio-de-Ĵaneiro. Dank' al la magio de skajpo la homoj alifine bone vidis kaj aŭdis min, sed la magio estis unudirekta: mi vidis la aŭskultantojn (iom malbone) sed iliaj voĉoj estis nekomprenablaj.

Kore salutas vin **Trevor Steele**



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**





# Interesaj faktoj por Propagando

## .Lernado de fremda lingvo postulas

- Lernu legi la skribitan lingvon. Ofte ĝi ne agordiĝas kun la parolata lingvo...
- Lernu la gramatikon. Ofte ĝi estas plena da esceptoj al la reguloj.....
- Lernu vortliston taŭgan por via espera uzo.....
- Lernu la standardan prononcon. Ofte ne agordas kun la parolata lingvo..
- Lernu la lokan parolatan lingvon.....
- Lernu la ĉiutage mallongigitan parolatan lingvon.....
- Lernu la idiomojn de la lingvo .....
- Lernu kiel kompreni la parolatajn respondojn al viaj demandoj.....

### Komparu Esperanton

- ..Fonetike senescepta
- ..17senesceptaj reguloj
- ..Kunmetitaj vortoj
- ..Unu prononco
- ..Ne ekzistas
- ..Ne ekzistas
- ..Ne ekzistas
- ..Unu monda lingvo

Roger Springer Ĉu vi povus pli bonigi tiun tabelon? Ĉu mi fogesis ion? [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)

## Esperanto ne havas tiujn malfacilaĵojn

**Do** Esperanto estas la plej taŭga lingvo por instrui lerneajn studentojn ĉar oni lernas la bazajn principajn faktojn pri lingvoj pri kiuj multaj denaskaj parolantoj ne scias.

**Ankaŭ** La studentoj lernas ne timi lingvan studon ĉar Esperanto ne havas la problemojn listatajn supre. Tiuj, kiuj havas lingvan talenton, poste lernos aliajn lingvojn. Tiuj, kiuj ne havas tiujn talentojn fiere estos dulingvaj.

Roger Springer



Semoj en ŝrankoj ne kreskos,  
Ekstere miloj  
mortos.  
**SED**



Unu disigita semo povas kreski ĝis  
bela estaĵo. Semu Esperanto-semojn



Roger Springer



**3zzz** La teamo de la Esperanto-grupo en 3ZZZ kore dankas la donacintojn , kiuj ebligas ke la programo daŭru plian jaron, almenaŭ . Espereble iu el vi gajnos unu el la premioj

En la elsendo de la 21a de oktobro aŭdeblas raporto pri la kunveno de esperantistoj kaj ne-esperatistoj en Torquay, pri Grezijono . Vi ankaŭ ekscios kial ne eblas tikli sin mem

Franciska Toubale

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**